





Paco .. finfine

Jill Murphy



Libere tradukita de Nikola
kaj Martin Markarian




Estis malfrue.




Sinjoro Urso estis laca,
 Sinjorino Urso estis laca,
 kaj
 Bebo Urso estis laca ...







... do ili cîuj iris al la lito.



Sinjorino Urso endormiĝis.
Sinjoro Urso ne sukcesis endormiĝi.





Sinjinorino Urso komencis ronki.


„RONK, RONK“ ronkis Sinjinorino Urso,

„RONK, RONK, RONK.“

„Ho, NE!“ diris Sinjinoro Urso,


„Mi ne povas toleri TION.“

Do li iris provi dormi en la ĉambro de Bebo Urso.





Ankaŭ Bebo Urso ankoraŭ ne dormis.
Li kuŝis en la lito kaj imitis aviadilon.
„NIAŬ!“ diris Bebo Urso,
„NIAŬ!, NIAŬ!“
„Ho, NE!“ diris Sinjoro Urso,
„Mi ne povas toleri TION.“
Do li iris provi dormi en la loĝĉambro.






TIK-TAK... faris la loĝĉambra horloĝo...


TIK-TAK-TIK-TAK. KUKU! KUKU!

„Ho, NE!“ diris Sinjoro Urso,

„Mi ne povas toleri TION.“

Do li iris provi dormi en la kuirejo.






GUT', GUT' ... likis la kuireja krano.


HUMMMMMMMMMMMMMMM ... faris
la fridujo.

„Ho, NE!“ diris Sinjoro Urso,

„Mi ne povas toleri TION.“

Do li iris provi dormi en la ĝardeno.





Do, vi ne povus imagi kiom da
bruoj estas nokte aŭdeblaj en la
ĝardeno.

„HU-HU, HU-HU“ kriis strigo.


„ŜNUK, ŜNUK“ faris erinaco.

„MIAAAAAAAAAAŬ“ kantis katoj sur
la muro.

„Ho, NE!“ diris Sinjoro Urso,

„Mi ne povas toleri TION.“

Do li iris provi dormi en la aŭto.





Estis malvarme kaj
malkomforte en la aŭto sed
Sinjoro Urso estis tiom laca ke
li ne rimarkis tion.

Li ĵus ekdormis kiam ĉiuj birdoj
komencis kantadi kaj la suno
ekbriletis tra la fenestro.


„PIIP, PIIP“ kantis la birdoj.


BRIL' BRIL' faris la suno.

„Ho, NE!“ diris Sinjoro Urso,

„Mi ne povas toleri TION.“

Do li reiris en la domon.








En la domo Bebo Urso profunde dormis, kaj Sinjorino Urso alimaniere kuŝis kaj ne plu ronkis.

Sinjoro Urso enlitiĝis kaj fermis siajn okulojn.

„Paco...finfine“ li diris al si mem.







Kaj tion ŝi faris.